373 INTENDANCE D'ALGER DEPOT LEGAL

1re Année — Vendredi 5 Mai 1905 — N° 6

5 Centimes — LA — 5 Centimoj

ALĜERIA STELO

L'ÉTOILE ALGÉRIENNE

Petit Organe de Propagande Espérantiste de l'Afrique du Nord

BI-MENSUEL ★★★ DUONMONATA

Prix de l'Abonnement annuel		Kosto de la Jara Abono	
Algérie, Tunisie	2 fr. »	Alĝerujo, Tunisujo	2 fr. »
France	2 fr. 50	Francujo	2 fr. 50
Etranger	3 fr. »	Eksterfrancaj landoj	3 fr. »

Les Annonces sont reçues à l'Administration du Journal, 57, rue d'Isly, ALGER. *Prix sur demande*

DIRECTEUR-FONDATEUR **Barthélemy BALS**
ADMINISTRATEUR **Louis LANDES**

La Anoncoj estas ricevataj al la Administracio de la Ĵurnalo, 57, rue d'Isly, ALGER. *Prezoj laŭ peto*

Sciigo tre grava

La Administracio de l' Ĵurnalo respekte sciigas la francajn kaj fremdajn grupojn al kiuj ni sendis ĝis nun la « Alĝeria'n Stelo'n » ke ni ne povas daŭrigi la sendo de l' Ĵurnalo al tiuj, kiuj ne pagis la abonon. Sekve, tiu ĉi numero estas la lasta sendata al la diritaj grupoj.

Ni ankaŭ petas niajn abonintojn, kiuj ankoraŭ ne pagis la abonon al la Ĵurnalo, sendi ĝin al ni, kiel eble plej baldaŭ.

L'EXPOSITION ESPÉRANTISTE D'ALGER
ESPERANTA EKSPOZICIO EN ALĜER

Nous pouvons dire que l'Exposition espérantiste d'Alger a été un immense succès pour la langue Esranto.

De son inauguration jusqu'à sa clôture, un très grand nombre de personnes l'ont visitée avec beaucoup d'intérêt. Pendant la journée du dimanche 16 avril, plus de quatre mille personnes sont venues voir cette intéressante exposition, remarquablement arrangée par quelques fervents espérantistes du Groupe nord-africain.

Nous avons pu voir d'abord un graphique de la progression de l'Esperanto dans le monde ; nous avons compté 203 groupes, qui propagent la langue internationale.

Ensuite, une petite comparaison de l'Esperanto avec le Volapük ; de très belles et intéressantes cartes postales du Danemark et de Finlande, la Presse espérantiste (40 journaux et revues), les relations internationales à l'occasion du nouvel an, des spécimens de propagande en Angleterre, Bohême, Espagne et Allemagne, des cartes postales du dernier congrès de Calais-Douvres.

Ni povas diri, ke la Alĝera Ekspozicio estis grandega sukceso por la lingvo Esperanto.

De ĝia komenco ĝis ĝia fino, multego da personoj ĝin vizitis kun granda intereso. En la tago dimanĉo 16-a de aprilo, pli ol kvar mil personoj vizitis tiun interesan ekspozicion, rimarkinde aranĝitan de kelkaj fervoregaj esperantistoj de la nordafrika Grupo.

Unue, ni vidis desegnaĵon de la progresado de Esperanto en la mondo ; ni kalkulis 203 grupojn, kiuj disvastigas la internacian lingvon.

Poste, malgrandan komparadon de Esperanto kun Bolak kaj Volapük ; tre belajn kaj interesajn poŝtkartojn el Danujo kaj Finlando, la gazetaron esperantistan (40 ĵurnalojn aŭ revuojn), la internaciajn rilatojn pri la nova jaro, propagandajn specimenojn el Anglujo, Bohemujo, Hispanujo kaj Germanujo, poŝtkartojn el la lasta kongreso de Calais-Douvres.

La maison Gaydet et Cie, de Roubaix avait envoyé des spécimens de laines avec leurs diverses transformations. Une maison d'Orléans avait exposé aussi des échantillons de draps et de dentelles de Valenciennes. M. Canovas présentait sa nouvelle marque d'huile kabyle « La Verda Stelo » ; puis nous voyons des prix-courants et circulaires en Esperanto, de la maison Gaumont et Cie (articles de photographie) ; l'Esperanto et la sténographie ; des circulaires de diverses maisons employant la langue Esperanto pour leurs relations commerciales ; des revues et des cartes postales illustrées d'Allemagne, de Frankfort, Wurtenberg, Bohême, Moravie, Autriche-Hongrie ; d'Angleterre, du Canada, des Indes anglaises et de Vladivostok.

On peut remarquer principalement de très belles dentelles de la maison Davenière, de Calais, qui emploie aussi l'Esperanto pour ses relations avec l'étranger.

(La fin au prochain numéro).

Louis LANDES.

La firmo Gaydet, kaj Ko, el Roubaix, sendis lanajn specimenojn, kaj iliaj diversajn aliformigojn. Firmo de Orleans sendis ankaŭ drapajn specimenojn kaj Valenciennes'ajn puntojn ; S-ro Canovas sendis specimenon de sia oleo kabila, kun marko « La Verda Stelo » ; prezarojn kaj cirkulerojn el la firmo Gaumont kaj Ko, vendistoj de fotografiloj ; Esperanton kaj stenografion ; ni vidas ankaŭ cirkulerojn el diversaj firmoj uzantaj la lingvon Esperanto por iliaj internaciaj rilatoj ; revuojn kaj ilustritajn poŝkartojn el Germanujo, Frankfort, Wurtemberg, Bohemujo, Moravio, Aŭstro-Hungarujo; el Anglujo, Kanado, Angla Indujo kaj Vladivostok.

Oni povas rimarki precipe tre belajn puntojn el la Kalais'a firmo Davenière, kiu uzas ankaŭ Esperanton por ĝiaj internaciaj rilatoj.

(La fino en nia proksima numero).

Ludoviko LANDES.

Kelkaj Impresoj pri mia Vojaĝo en Alĝero

Mi jam konis Tunison kaj Oranon, sed ankoraŭ mi ne vidis Alĝeron. Por tio, mi estis tre feliĉa, kiam, pri personaj aferoj mi devis veturi Alĝerujon por iri en Setifon.

Mi alvenis Alĝeron la 10-an de lasta Januaro, je la 3-an horon tage, per la vaporŝipo « Eugène Pereire », de la Transatlantika kompanio.

Kiam la ŝipo eniris la havenon, mi miris pri la belega panoramo, kiun mi vidis : La urbo prezentiĝas tute blanka per la domoj, kiuj de l' maro supreniras ĝis la pinto de la monteto, kie Alĝero kuŝas.

La vidaĵo vere estas ensorĉa kaj belega, kaj neniam mi vidis saman naturan ordon ĉe la urboj, kiujn antaŭe mi vizitis.

Dekstre mi rimarkis la statuon de la Virgulo, alvokitan « Notre-Dame-d'Afrique » kaj, maldekstre, Mustafa, landeton, kie troviĝas multaj konfortaj kaj riĉaj hoteloj por la fremdloĝantoj.

Ĉe la elŝipigejo, juna Esperantisto de la Grupo de Alĝero, S-ro Bresson, atendis min, kaj ĝentile li kondukis min ĉe bona hotelo, poste, dum la tuta vespero, li vizitigis min la araban urbon, kiu estas tre kurioza kaj interesa : multaj stratoj mallarĝaj, kie ofte la tegmentoj tuŝiĝas, kaj, pro tio, estas tre mallumaj, faras la araban kvartalon ; la domoj estas tre strangaj kun iliaj fenestroj tute fermitaj per ligna maldika muro ; la arabaj butikoj estas veraj truoj, en kiuj la butikisto sidas sur siaj kruroj kruĉigitaj. Cetere, ĉiuj arabaj stratoj estas tre malpuraj kaj malbonodoras pro la varma oleo, kiun la Araboj uzas por kuiri kukojn aŭ aliajn manĝaĵojn.

La Europa kvartalo estas vere tre admirinda : larĝaj stratoj kun riĉaj butikoj, belegaj bulvardoj, kaj publikaj ĝardenoj kun multaj arboj kaj floroj. Fine, Alĝero al mi lasis tre agrablan impreson ; la klimato, tiel dolĉa, ankaŭ al mi tre plaĉis, kaj mi estus tre feliĉa povi ofte reveni en Alĝeron.

Mi devas nun tutkore danki la kapitanon Capé, sinjorojn Bresson (patro kaj filon), kaj sinjorojn Baxès kaj Roux, de la Grupo de Alĝero, pri la afabla maniero, kiun ili uzis al mi, dum mia loĝado en Alĝero.

Baldaŭ mi raportos pri mia vojaĝo en Setifo.

Grafo Albert GALLOIS,
Membro de l' Esperantista Grupo de Alĝero
kaj de la Nordafriko.

TIMGAD

Kiel ni diris en nia lasta numero, ni povas publikigi tiun fragmentan priskribon de Timgad dank' al la afableco de la aŭtoro de l' interesa verko « De Lambèse à Timgad », S-ro LAYER, el Rouen (Francujo).


Ni nur intencas doni ideon pri la mirindaj Timgad'aj ruinoj, kaj ne plene priskribi ilin. Cetere, la afero estas neebla ĉar la elfosadoj konstante pligrandigas la elfositan trezoron.

Cetere, ni konigos, en aldoneton, la ĉefajn eltrovojn faritajn post la eldono de la franca verko de S-ro Layer.

Li bonvolu akcepti niajn varmajn dankojn por sia afableco.

Kiam oni eliras el LAMBESE, la vojego altiĝas per deklivo sufiĉe facila por ke du ĉevaletoj fortikaj povas trakuri sur ĝi trote. Baldaŭ oni renkontas triunfan pordegon kun duone forigita surskribo sciiganta, ke tiun konstruaĵon aldonis la Timgadanoj el VERECUNDIA, malgranda « municipium » apuda. Post kelkaj kilometroj, la vojo iom subite kurbiĝas kaj la deklivo maliĝas. Oni haltas momente: sube la vojo, laŭ duobla vico, staras tendoj de « duar'o ». De centjaroj, al la migrantuloj sufiĉas tiuj neperfektaj rifuĝejoj. ilia kamelhara teksaĵo sendifekte toleras samtempe la malbonajn veterojn, la sunan kalorego, kaj la translogadojn okazantajn ĉiafoje, kiam estas konsumitaj la paŝtejoj. Tiuj migradoj forpuŝas la paŝtistan Arabon, per nelongaj translokiĝoj, el Altaj Plataĵoj ĝis Mediterraneon, por la livero de miloj da ŝafoj. Tiuj translokiĝoj reiĝas ĉiajare laŭ la sezonoj ; tial revenadas la karavanoj, laŭ la sama regulece, kiu reaperigas en niaj landoj la gvidatan nur de instinkto hirundon.

Alveninte al la rando de monteto, sur la flanko de valeto oni lasas la vojegon, kaj per vojeto oni aliras al la ruinaroj. Timgado — antikvatempe THIMUGADI — kuŝis sur monteta flanko; jam de dudek jaroj, oni ĝin elterigadas: elfosado mirinda tio estas. Dank' al la situacio de la urbo, al la malproksimeco de ia ajn nemigrema loĝantaro zorga profiti tute pretan materialon, ankaŭ dank'al tertremoj kaj tera surmeto, oni hodiaŭ eltrovas romanan urbon tute integralan. En la jaro 1880-a komencis la fosado ; ĝin oni daŭrigis dum la jaro 1883-a ; en la 1885-a tute reaperis la FORUM. La fondo de Timgado okazis dum la komenco de la dua centjaro de la Kristana tempokalkulo, dum la regado de Traĵano. Al arkeologio, tiu urbo estas tre speciale interesega ĉar ĝia konstruiĝado disvastiĝis laŭ la primitiva plano. Ĝiajn ĝeneralajn liniojn ne difektis la necesaĵoj de pligrandigo preteriranta — almenaŭ rimarkinde — trans ĝia komenca plano.



LA « FORUM »

De kelkaj jaroj la laboradoj por fosado kaj parta restarigo multege progresis, dank' al la agema direkto de S-ro Ballu kaj la aktiva instigo de lia distinginda helpanto S-ro Vars. Antaŭ nelonge, S-ro Vars forlasis tiun oficon por reiri Francujon.

Plie la du vojegoj, « Decumanus maximus », direktanta el okcidento orienten, perpendikulare rilate al « Cardo maximus » kiu kuŝas nordesuden, la ĝenerala sistemo de la vojaro, laŭ la samaj direktoj formita, preskaŭ tute elfosita estas. La ĉefaj vojoj estas ornamitaj, ĉiuflanke, per iom simplaj kolonoj nun sur iliajn piedestalojn restarigitaj. La vojoj sendiference nomitaj « Decumanus » aŭ « Cardo », havis specialajn numerojn kiel tiuj de la Unuigitaj Ŝtatoj.

(Daŭrigota). Traduko de Esperantisto.

★ NIA ALĜERIA PAĜO ★

La Conŝtanŝtin'a Valo

Ĉu vi konas Constantin'on? Tiu ĉi urbo, amfiteatre konstruita sur grandega ŝtonego, ĉiuflanke superas valon kapturne profundegan, kiu ĝin tiel ĉirkaŭas kiel monaĥo volvas ŝnuron ĉirkaŭ sia talio.

Tiu ĉi valo, vera profundegaĵo, estas certe unu el la plej belaj Constantin'aj vidaĵoj, kiuj mirigas la turistojn.

La vetero estas bela hodiaŭ. La vintrajn neĝojn anstataŭas la printempa suno. Ni eliru el urbo, se vi volas, kaj ni trairu « El-Kantara'n » ponton.

Kiam ni alvenas mezen de tiu ĉi ponto, tiel kuraĝe ĵetita super profundegaĵon, senvole ni staras kaj ekrigardas la malplenaĵon: sube niaj piedoj la valo, profundega deŝiraĵo, maltegas nudajn ŝtonegojn, unuaj rajdantajn sur aliaj. Sur la fundo fluas la rivero « Rhummel », aŭ prefere torento, kiu alvenanta ponton ŝajnas subteren malaperi. La naturmontraĵo estas terure grandioza. Oni moviĝas je tremfrosto kiam oni rigardas tiun malplenaĵon kiu ensorĉas nin kaj tra kiu, tiom da malesperuloj sin ĵetis kaj mortiĝis!

Iam nur la nigraj flugantaj kornikoj povis sekvi la ebenaĵojn de tiaj starantaj ŝtonegoj. Nun tiuj ĉi nepratikeblaj profundegaĵoj fariĝis atingeblaj. Vojeto estas konstruita, dank' al kiu oni povas detale viziti la sovaĝajn belaĵojn de l' profundegaĵo.

Sed ni antaŭeniru! Maldekstren ni malsupreniras rigidan deklivaĵon, kiu, tra verdaj florbedoj, alvenas al la eniro de tiu ĉi vojo, kiun oni nomis « Vojo de l' Turistoj ».

Tie ĉi mirinda kaj belega estas vidaĵo! Ni staras sur vojeto farita proksimume meze de l' profunda valo. Supre, la ununura granda arkaĵo de l' ponto majeste aperas kaj la domoj konstruitaj sur la bordo de l' profundegaĵo ŝajnas al ni tute malgrandaj kaj kontraŭ ŝtonegoj alkroĉitaj kvazaŭ aglaj nestoj. Sube, la rivero bruegas, ju pli malvastigata inter la ŝtonoj des pli rapide fluanta kaj rulanta siajn akvojn.

P. DIFFRE

(Daŭrigota).

EXPOSITIONS ESPÉRANTISTES

Deux expositions espérantistes doivent avoir lieu très prochainement. La première à Malte et la deuxième à Brunn (Moravie).

Nous souhaitons plein succès à ces deux expositions.

ESPERANTISTAJ EKSPOZICIOJ

Tre baldaŭ okazos du novaj ekspozicioj La unua en Malto, kaj la dua en Bruno (Moravio).

Ni deziras al tiuj ekspozicioj plenan sukceson.

Amuzaĵoj

UNUA PROBLEMO

Mi ĉirkaŭas.
Antaŭmetu prefikson.
Tiam mi klarigas.

DUA PROBLEMO

Mia unua estas pronomo.
Mia dua dormilo.
Mia tuto malkonsentiĝo, malfeliĉeco.

TRIA PROBLEMO

Daŭrado.	o o o
Ĉefnombro.	o o o
Substantivonombro	o o o

Ĉiun vorton oni legas horizontale kaj vertikale.

KVARA PROBLEMO

Kial la muelistoj portas blankajn ĉapelojn, kaj la karbistoj nigrajn ĉapelojn?

A. BAISSAC.

RECHERCHES dans tous les pays de généalogies, documents historiques et biographiques, titres nobiliaires, armoiries. ordres de chevalerie, distinctions, etc. *Informations,* **C. MULKAY,** 16, rue des Minimes, *Bruxelles* (Belgique). Reçoit sans frais commons, annonces, abonnements à *La Alĝeria Stelo.*

MANDARENA BOUGIE'A LIKVORO
4 fr. **50** la litro hejmen
ALĜERIAJ ĈAMPANIGITAJ VINOJ
12 fr. la kesto da 12 boteloj
Octave LAMBERT
5, Rue Edmond-Adam
ALGER

Le Gérant : MICHEL LLEDO. Alger. — Imp. J. TORRENT, 57, rue d'Isly.
Lettres accentuées de la Maison TURLOT, CHAIX et Cie, 128, rue de Rennes, Paris

Michel Lledo

tirage 4,800